Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-a de oktobro 2024

Ni gratulas Unuiĝintajn Naciojn okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2024, kaj ni salutas la spiriton de optimismo enkorpigitan en ĝian Ĉarton.

Malgraŭ cinikismo de potenculoj kaj duboj de multaj ordinaraj homoj kiuj hodiaŭ suferas, la espero de mondo sen militoj, kie ĉies homaj rajtoj estas respektataj, kaj kie ĉiuj homoj havas voĉon en spirito de justeco kaj demokratio, ankoraŭ resonas tra la mondo 79 jarojn post la ekvalidiĝo de la Ĉarto de UN la 24-an de oktobro 1945.

Kiel diris la Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres, dum la lastatempa 79-a Ĝenerala Asembleo de UN: "Homoj de la mondo fidas al ni– kaj venontaj generacioj retrorigardos al ni. Ili konstatu, ke ni troviĝas ĉe la flanko de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj... flanke de niaj komunaj valoroj kaj principoj... kaj ĉe la ĝusta flanko de la historio."

Entute 193 ŝtatojmembras en tiu Ĝenerala Asembleo - niaj landoj, niaj registaroj. UN restas inkluziva kaj reprezenta korpuso por plani kolektivan agadon. Tamen ni bezonas la sindevigojn de tiuj membraj ŝtatoj – al la propraj popoloj kaj al la mondo.

Ni, la popoloj, rezolute postulas, ke niaj landoj realigu la celojn de tiu esperplena Ĉarto. Ke ili konservu la internacian pacon kaj sekurecon, praktiku toleremon, evoluigu amikajn rilatojn, unuiĝu por solvi internaciajn problemojn, kaj harmoniiĝu. Ĉiam restos potencialaj kaŭzoj de konflikto, sed ili solviĝu per kunlaboro en la spirito de la Ĉarto de UN.

Kunlaboro postulas reciprokan interkompreniĝon kaj reciprokan konfidon.Konfido estas antaŭkondiĉo de paco, kaj konstruata per aŭskultado kaj akceptado, per rekono kaj respekto. En tiu kampo la lingvo estas la fundamenta bazo de komunikado, kaj multilingvismo kaj egaleca komunikado trans la lingvoj estas fundamenta valoro por establi pacon kaj konfidon.

Universala Esperanto-Asocio antaŭenigas la spiriton de la Ĉarto tra la tuta mondo pere de la Internacia Lingvo Esperanto.Per multlingvaj voĉoj, kaj speciale per la Internacia Lingvo Esperanto, ni reasertas la principojn kaj celojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj rekonfirmas nian promeson kunlabori por pli bona mondo por ĉiuj.